I. F. E. A.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Aderente alla INTERNACIA FEDERACIO ESPERANTISTA FERVOJISTA (I. F. E. F.);
alla UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO (U. E. A.) e alla FEDERAZIONE ESPERANTISTA ITALIANA (F. E. I.)
Sede Centrale: Dopolavoro Ferroviario - Piazza Calderini 4 - Bologna (Italujo)

ESPERANTO

# Informal Bulteno

ITALA FERVOJISTA ESPERANTO - ASOCIO

REDAKTEJO: Bologna - Via Donato Creti N. 61 - Tel. 59-071 REDAKTORO: Gimelli p. l. Germano

N° 2 - 3 = Novembro kaj Decembro 1954 -an

## KOMUNIKOJ PRI LA 7-a IFEF-KONGRESO EN ZÜRICH

8-a ĝis 13-a de majo 1955 Adreso de L.K.K.: Poŝtfako 2311 Zürich 11

Informilo N°2 PROVIZORA KONGRESA PROGRAMO

Dimanĉo, 8-a de majo: Dum la tuta tago akceptejo en la stacidomo malfermata
h.20.00 Interkonatiĝa Vespero en Limmathaus.

Lundo, 9-a de majo :
h. 9.00 Kunsido de estraro kaj delegitaro de I.F.E.F.
h.13.00 Komuna tagmanĝo en SBB-Kantinoj.
h.14.00 Faka Ekskurso al SBB-Centra-Riparejo Altstetten.
h.16.00 Kunsido de la Terminara Komitato.
h.18.00 Komuna Vespermanĝo.
h.20.00 Solena Malfermo de la Kongreso.

Mardo, 10-a de majo: (samaj manĝotempoj kiel lunde)
h. 9.00 Unua Laborkunsido de I.F.E.F. (Ekskurso nur por virinoj)
h.14.00 Komuna Fotografiĝo.
h.14,30 Fakaj Prelegoj.
h.20,00 Film-Ve spero

Merkredo, 11-a de majo: (samaj manĝotempoj)
h. 9.00 Dua Laborkunsido de I.F.E.F. (Ekskurso nur por virinoj)
h.14.00 Ŝipekskurso sur la Lago de Zürich.

Ĵaŭdo, 12-a de majo: (samaj manĝotempoj)
h. 9.00 Tria Laborkunsido de I.F.E.F. (Ekskurso nur por virinoj)
h.10.30 Fakaj prelegoj
h.14.00 kaj 16.00 Rondveturado tra Zürich (sempage) 1-a kaj 2-a grupoj.
h.20.00 Folklora Vespero.

Vendredo, 13-a de majo: Postkongresa ekskurso al la narcisaj kampoj de "Les Pleiades" super Vevey, ĉe la Lemana Lago.

ALIĜILO - Estas aldonita al la IFEF-Bulteno. Uzu ĝin baldaŭ. Frua aliĝo kaj mendo de loĝejo havas la preferon loĝi pli komforte kaj pli proksime. Atentu bone la favoran kotizon por IFEF-membroj ĝis 31-a de Januaro 1955. L.K.K. akceptos aliĝilojn nur ĝis 15-a de Aprilo 1955.

Kongres-aliĝo sen samtempa pago de la kotizo estas ne-ebla. Ne ŝarĝu LKK-on per rektaj aliĝiloj, aranĝu vian partoprenon pere de via landa peranto.

KONGRESPROPONOJ - Kongresproponojn, klare formulitajn, kaj eventuale la nomojn de la kandidatoj por la ĉefestraro oni sendu antaŭ la 1-a de januaro al nia sekretario J.Lok, Orteliusstraat 108. III, Am sterdam-W. Nederlando.

40-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO
30/VII-6/VIII 1955, BOLONJO

Adreso: C.I.T. Piazza Nettuno 2, Bologna, Italujo - Banko di Napoli, konto 2824
Ĝiro: Grupo "A.Tellini", Piazza Medaglie d'Oro 3, N°8/20620

N-ro 2 OFICIALA KOMUNIKO Decembro 1954

Novaj Perantoj: Belgujo (Flandra Ligo Esp.): F-ino J.Terrijn, Raapstraat 74, GENT.
Nederlando: Nederlandse Esperantisten-Vereniging, Stadionkade 6, Amsterdam.
Norvegujo: F-ino V.Birkevold, Hjelmelandsgt.77, STAVANGER.
Svislando: S-ro W.Laederach, Küngenmatt 31, ZURICH 55: Poŝtkonto 33612.
La nederlanda asocio L.E.E.N. komisiis la peradon de kotizoj al S-ro J.Telling, Schietnaanlaan 106 a, ROTTERDAM-C.

Karavanoj: Laŭ nia scio la jenaj instancoj aranĝas karavanojn:
Aŭstria Esperanto-Federacio, Fünfhausgasse 16, WIEN XV
Flandra Ligo Esperantista, Postbus 100, MECHELEN, Belgujo
Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Aven., LONDON W.11, Anglujo
S-ro S.K.Nielsen, 129 Havepladsvej, FREDERICIA, Danujo
CDEL's kongresrejse-avdeling, Pr.Jorgensgade 4-A-II, KOPENHAGEN, Danujo
S-ro M.Fouski (por Instruista Asocio) 22 rue Gauvin, ANGERS, Francujo
S-ro Carl Barthel, Wöhlerstr. 14, FRANKFURT a.M., Germanujo
S-ro J.Telling, Schietnaanlaan 106 a, ROTTERDAM-C, Nederlando
Philips Esperanto-Klubo, Zonheroosstr. 10, EINDHOVEN, Nederlando
F-ino V.Birkevold, Hjelmelandsgt. 77, STAVANGER Norvegujo (por N.E.L.)
Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, STOCKHOLM, Svedujo

Aliĝado: Aliĝilojn kaj bultenojn oni povas ricevi de la Landaj Asocioj de U.E.A., de U.E.A. mem en Anglujo kaj de la kongresa oficejo en Bolonjo. Estas konsilinde frue aliĝi por ĉi tiu, la JUBILEA Kongreso. Valoras atentigi, ke la kotizo altiĝas post la fino de decembro. La regulo pri rifuĉo de aliĝoj post junio validas ankaŭ por la nuna kongreso.

Kondiĉoj en Bolonjo: Aŭdiĝis esprimoj de antaŭtimo pri granda varmo en la kongresa urbo. Tial L.K.K. avizas, ke ĝi konsideras la aranĝon de eksterdomaj prezentoj dum la kongreso. Krome ĝi antaŭvidas, ke la kunvenoj de la kongreso okazos pli frue ol kutime por eviti la posttagmezan varmon. Por ordinara vizitado en la urbo, la famaj portikoj en ĉiuj stratoj donas bonan ŝirmon dum piedirado sur la trotuaroj. La situacio pri hoteloj kaj pensionoj estas tre bona. Bonvolu noti (precipe karavan-organizantoj) ke oni devas sin turni al C.I.T. pri loĝejoj ĉar tiu instanco havas solrajtojn por la kongresa semajno. Detalaj informoj estos en la Dua Bulteno kiu aperos en januaro.

Fervoja rabato: La itala fervoja instanco jam decidis doni rabaton de la vojaĝkosto sur enlandaj fervojoj okaze de la kongreso (al kaj de Bologna).

Kongresa Glumarko: Kun bela orgreso estas havebla. Folio da 25 markoj kostas 1 rpk., 6 pencoj aŭ 50 lirojn. Mendeblaj ankaŭ ĉe Perantoj, al kiuj pagu.

Folklora Vespero: Kun celo aranĝi Folkloran Vesperon la L.K.K. invitas grupetojn anonci sin por prezento de unu reprezenta popoldanco de sia lando. Pri detaloj informiĝu ĉe L.K.K.

Kongresaj fotoj: Kun la celo doni al la Kongresa Libro Jubilean karakteron la L.K.K. invitas alsendon de bonaj kaj klaraj fotoj el la fruaj kongresoj. La fotoj estos nepre resendataj post uzo. Kun la fotoj estu klare skribitaj detaloj pri personoj, lokoj, dato, kaj, la nomo kaj adreso de la sendinto.

Statistiko (ĝis fino de nov.): Argentino 1, Aŭstrio 4, Belgujo 3, Brazilo 3, Britujo 30, Danujo 6, Finnujo 4, Francujo 20, Germanujo 18, Hispanujo 3, Italujo 56, Jugoslavio 10, Nederlando 19, Norvegujo 3, Novzelando 1, Portugalujo 1, Sarlando 1, Svedujo 18, Svislando 9, Usono 3. Sumo, el 20 landoj, 213.

nome de la L.K.K.: Mason Stuttard, K.K.S.

Eco del nostro Congresso Nazionale di La Spezia -- Dal nostro Collega L. Angermayr di Linz riceviamo e pubblichiamo il seguente articolo:

La IV-a Itala Fervojista Esperantista Kongreso

La itala fervojista Esperantista asocio afable invitis delegiton al sia IV-a nacia kongreso je la 25-a kaj 26-a de Septembro 1954 en LA SPEZIA.

Post ronddemando flanke la A.F.E.F. finfine mi decidis akcepti tiun honoram taskon. Mi kunvenigis 2 junajn samideanojn el mia oficejo al tiu vojaĝo. Jam la 20an de Septembro ni forlasis la pluvaman hejmlandon kaj direktis nin al pli sunbrila regiono en Svisujo. En Zürich ni estis salutataj de Prezidanto de la svisa fervojista Esperantista asocio S-ano BIPP, interalie li diris al ni, ke oni jam komencis la laboron por nia VII-an IFEF-Kongreso. Post mallonga restado en la eleganta urbo Zürich, ni vizitis Zermatt kaj admiris la reĝon de montaro "Matterhorn". Alian tagon ni varmiĝis en la suno apud la Lago Maggiore. Vespere ni alvenis en Torino, kie ni estis akceptitaj de 2 junaj kaj belaj samideaninoj (la korespondantinoj de 2 kunvojaĝintoj). Sed tiuj 2 ĉarmulinoj zorgis ankaŭ por mi, ili kunvenigis 2 eminentulojn de torina Esperanto-movado, inter ili la konatan fervojistan E-pioniron D-ron BORIONE. Ni trap asis tre agrablan vesperon. La torina E-Asocio havas krom la E-kunvenejo ankaŭ 2 ĉambrojn luitajn en iama imperiesta palaco. Alian tagon niaj 2 amikinoj montris al ni la plej gravajn vidindaĵojn de la vere impona kaj belega urbo, kiam ni rigardis Medioevale en la Valentinoparko t.e. mezepoka vilaĝo kun kastelo, ni renkontis francajn gesamideanojn, ili estis gviditaj de alia torina esperantista knabino. La ĝojo pri tiu renkontiĝo estis granda. Posttagmeze ni adiaŭis de niaj karaj torinaj amikinoj kaj daŭrigis nian vojaĝon al Genova.

Tie ni estis akceptitaj de Prof.MALALTA, mondkonata itala E-pioniro. Li tuj venigis nin al la Esperanta-domo, kie ni ankaŭ tranoktis. Do, Vespere ni partoprenis la E-Kurson por komencantoj gvidatan de vigla Prof. MALALTA. Tuj okazia amikeca kontakto inter ni kaj la lernantoj, kiuj nun estas daŭrigintaj per korespondado. La prezidanto de genova E-Asocio S-ro Segrè komisiis min ankaŭ transpreni bondezirojn kaj salutojn en la nomo de Genova E-asocio al la konferenco de italaj E-fervojistoj en la Spezia. Post antaŭtagmeza promenado en la rava Nervi, do bedaŭrinde tro frue ni devis anvagoniĝi kaj daŭrigi la vojaĝon al La Spezia.

Ni alvenis tie tagmeze. Post komuna tagmanĝo, ni ekskursis aŭtobuse kaj ŝipe al pitoreska Portovenere. La fervojista K-do FONTANA el La Spezia preparis kun siaj afablaj kunlaborintoj al la preskaŭ 100 gesam ideanoj belegan vesperon en la urba koncertejo de La Spezia. Per la helpo de tre vigla estrino de la E-grupo en la najbara urbo MASSA, oni aranĝis ĝuoplenan vesperon kun artaj prezentadoj kiujn oni ne ofte aŭdas, kaj kun granda ĝojo ni povis konstati, ke la italaj Esperantistoj havas nun sian propran "Gigli" kiu kantas ankaŭ Esperantlingve. Pri la fama Esperantista tenoro BRANI kaj la pianisto Samideano D-ro DAZZINI en konvena tempo mi aparte raportos. Ankaŭ la Esperanta radioparolanto S-ano BLASIMME el Romo ĉeestis.

Dimanĉe miaj 2 akompanantoj veturis pli suden, sed mi partoprenis la kunvenon de itala fervojista Esperantistaro; ĝi okazis en la salono de Dopolavoro Ferr.

La Prezidanto Kav. ZACCONI malfermis la kunvenon. Li salutis kore la honorgastojn reprezentanton de itala fervoja administracio, la estrojn de Dopolavoro Ferroviario kaj la du eksterlandajn delegitojn S-anon AISSIOPOULOS el Ateno kaj min.

Pro ĉeesto de neesperantistaj gegastoj parte oni konferencis itallingve, do la Kav. ZACCONI afable tradukis al ni la plej gravan parton esperantlingve.

Ankaŭ la itala E-fervojista asocio havas la samajn zorgojn kiel ni, antaŭpuŝigi la E-movadon inter la fervojistoj kaj certigi la necesajn funkciulojn por organiza laboro. Tamen ili povis raporti pri nove fonditaj lokaj grupoj ĝis Napoli. La faritaj postuloj estas la samaj kiel en Nederlando.

Tre ampleksa estis la raporto de sekretario C.CERONI pri la IFEF-Kongreso. Nur malmultaj scias pri la teruraj malfacilaĵoj organizi tian gigantan kongreson, oni ne devas miri, ke la "motoro" de la VI-a IFEF-Kongreso S-ano CERONI el Verona nun

volas ripozi. Li eksiĝis kiel sekretario, sed li promesis subteni la landan organizon. La estraro esprimis al li kaj al liaj kunlaborintoj la merititan dankon.

La elekto ŝanĝis nur la sekretarion, la nova sekretario estas juna simpatia K-do FONTANA el La Spezia. La cetera estraro restis la sama. La Prezidanto Kav.ZACCONI per skuaj vortoj stimulis la ĉeestantojn al kunlaboro por nia sankta afero.

Je la fino la Prezidanto Kav.ZACCONI invitis ĉiujn al venonta UEA-Kongreso en Bologna 1955, li promesis, ke tiu ĉi kongreso estos la plej impona post la milito.

La lastaj vortoj de la Prezidanto estis, do, ĝisrevido ĉe nia VII-a IFEF-kongreso en Zürich. Post la kantado de la Esperanto himno sekvis la adiaŭo. La kunsido daŭris sen paŭzo ĝis posttagmeze. Estis iomete malfacile por mi sekvi diversajn invitojn, ĉu ankoraŭ resti en la bela "La Spezia" ĉu kunvojaĝi kun la veronaj kolegoj trans Parma, aŭ kun la kolegoj el Milano trans Genova.

Finfine mi vojaĝis kun la mongkonataj E-pioniroj K-doj QUARONE kaj CARENA laŭbor de de Levante. Ankoraŭfoje en Genova mi vidis vespere la ore lumigitan Mediteraneon.

L. ANGERMAYR

---

DANKO: La Itala Fervojista Esperanto-Asocio (I.F.E.A.) dankas IFEF-Estraron pro la sentaj de ĉagreno kaj simpatio esprimitaj al nia sekretariejo en okazo de la katastrofo de Salerno.

BONDEZIROJ: En okazo de la proksimaj festoj, kun varma koro, la estraro de I.F.E.A. kaj la Redakcio de "Informa Bulteno" frate deziras Bonan Kristnaskon kaj Feliĉan Novjaron al ĉiuj anoj kaj simpatiantoj de mia Asocio.

RADIO ROMA - Esperanto - Casella Postale 320 - R O M A (Italia)

DISSENDOJ EN ESPERANTO

DECEMBRO 1954-a

| | | | |
|---|---|---|---|
| 465 | merkredon la 1-an | - | Informoj el Italujo |
| 466 | vendredon la 3-an | - | Italaj belartaj urboj: Mantova |
| 467 | merkredon la 8-an | - | Strato Margutta-centro de la artista vivo en Romo |
| 468 | vendredon la 10-an | - | Leterkesto kaj bibliografio |
| 469 | merkredon la 15-an | - | L.L. Zamenhof -la poeto de la tutmonda frateco |
| 470 | vendredon la 17-an | - | Universalaj geniuloj: Michelangiolo |
| 471 | merkredon la 22-an | - | Kristanaj kantoj |
| 472 | vendredon la 24-an | - | La kristnaska nokto |
| 473 | merkredon la 29-an | - | La mirindaj grotoj de Castellana |
| 474 | vendredon la 31-an | - | La lasta tago de la jaro |

JANUARO 1955-a

| | | | |
|---|---|---|---|
| 475 | merkredon la 5-an | - | Mondo esperantista |
| 476 | vendredon la 7-an | - | La blindulo Louis Braille inter la granduloj en la Pariza Panteono |
| 477 | merkredon la 12-an | - | Informoj el Italujo |
| 478 | vendredon la 14-an | - | Leterkesto kaj bibliografio |
| 479 | merkredon la 19-an | - | La klera Bolonjo |
| 480 | vendredon la 21-an | - | Italaj belartaj urboj: Certaldo |
| 481 | merkredon la 26-an | - | Opero "Turandot" de G. Puccini |
| 482 | vendredon la 28-an | - | G. Boccaccio, la patro de la itala prozo |

Prelegas: merkredo-S-ro Luigi Minnaja = Vendrede-Prof.D-ro Vincenzo Musella

---

La dissendoj okazas de h. 18,50 ĝis h.19,10 (M.E.T.)
Stacioj: m.31,33 = mc/s. 9,52 kaj m.49,92 = mc/s. 6,01

Al ĉiuj niaj fidelaj geaŭskultantoj ni deziras BONAN KRISTNASKON KAJ FELIĈAN NOVJARON 1955-a

La Fakestro: B l a s i m m e

RIUNIONE DEL CONSIGLIO DIRETTIVO DELLA I.F.E.A. PER LA NOMINA DELLE NUOVE CARICHE E PER IL PASSAGGIO DELLE CONSEGNE DALLA SEGRETERIA DI VERONA A QUELLA DI LA SPEZIA - PARMA - 14 NOVEMBRE 1954.

La riunione è stata tenuta nell'Università di Parma nell'Aula degli esami di medicina - per espresso desiderio del Magnifico Rettore, Presidente della Federazione Esperantista Italiana (F.E.I.) - Prof. Giorgio Canuto.

"Il Prof. Canuto porta il saluto ai presenti ed alla I.F.E.A. bene augurando al nostro Movimento che ritiene molto importante perchè vuol dimostrare quanto può essere utile l'associazione Ferroviaria Mondiale all'Esperanto.

Il Cav. ZACCONI ringrazia con brevi parole il Prof. CANUTO spiegando poi il motivo della riunione. Raccomanda ai colleghi di La Spezia di tenersi a contatto con il Gruppo di Parma ed eventualmente chiedere consigli e suggerimenti dalla ex Segreteria di Verona dalla quale potranno ricevere sempre buoni consigli.

Vengano scambiati i carteggi e prese le consegne chiedendo diversi chiarimenti su punti di ordinaria amministrazione.

Il Prof. CANUTO sempre pronto a dare con la sua autorevolissima parola l'aiuto in qualsiasi occasione, si rammarica di non essere stato presente al nostro Congresso di La Spezia per impegni precedenti e dichiara che potrà essere a disposizione per eventuali conferenze od altro. Gentilmente fa poi visitare ai presenti diversi locali dell'Università e nel cortile viene scattata una fotografia a ricordo. Ripresi i lavori della riunione il Sig. CERRONI rammenta la necessità di addivenire alla nomina di un Presidente, un Segretario e un Cassiere.

Il Sig. GIMELLI propone come Presidente la conferma del Cav. ZACCONI, come Segretario il Sig. FONTANA, e come Cassiere il Sig. LICOFONTE.

Il Cav. ZACCONI fa poi notare che sarebbe necessario nominare a Vice Presidente il Sig. CERRONI il quale è il più adatto per la sua competenza nell'organizzazione e per le esperienze acquisite con la numerosa corrispondenza tenuta con la I.F.E.F. Tale riconoscimento è stato approvato all'unanimità come pure le altre cariche.

Il collega LICOFONTE fa presente che i Consiglieri di La Spezia faranno del loro meglio, ma difettano di esperienza; il Cav. ZACCONI tranquillizza il Sig. LICOFONTE osservando che quasi sempre la passione e la buona volontà sopperiscono molte deficenze e che tutti i colleghi saranno sempre a disposizione per qualsiasi consiglio ed aiuto specie se tale consiglio ed aiuto saranno richiesti a Verona dove molte cose sono oggetto di lunga esperienza.

Redattore del Bollettino viene confermato il collega GIMELLI (Via Donato Creti n°61 Bologna).

Il Prof. CANUTO prima che i lavori avessero termina ha comunicato la portata di un avvenimento importante leggendo una mozione presentata dall'On. CHIOSTERGI durante l'importantissimo convegno dell'Associazione Mazziniana Italiana.

Tale mozione favorevolissima all'Esperanto nel contenuto, auspica il riconoscimento della lingua ausiliaria internazionale Esperanto come mezzo di comprensione fra tutti i Popoli del mondo, invitando gli uomini di buona volontà ad appoggiare l'auspicata realizzazione. Tale mozione è stampata nel numero, che illustra i lavori del convegno, del giornale "Il Pensiero Mazziniano.

Il Collega CERRONI viene incaricato di chiedere al L.K.K. del prossimo Congresso dell'I.F.E.F. in Zurigo la possibilità di concedere il ribasso ai pensionati e procrastinare la data del 31/1/1955 per il ribasso da 18 a 15 franchi svizzeri della quota di partecipazione al Congresso stesso.

Alle ore 16,30 il Presidente Cav. ZACCONI, dopo aver letto due lettere, una del Collega QUARONE ed una del Collega ALCIATI che si scusano della forzata assenza alla riunione del Consiglio Direttivo, chiude il Convegno ringraziando il Prof. CANUTO della squisita ospitalità.

[illegible] -

VOGHERA. - Il 22 Novembre 1954 per la inaugurazione del corso di Esperanto fra i Ferroviari, si è tenuta una interessante Conferenza dal Prof. MIATTI di Milano che ha messo in rilievo l'utilità e l'interesse della lingua ausiliaria Internazionale Esperanto.

La Conferenza ha sollevato molto interesse fra l'uditorio e si spera in un pieno successo del Corso testè iniziato.

## NOTA DEL CASSIERE

Si sta chiudendo anche l'anno solare. Ripetiamo gentilmente ed anche caldamente l'appello del Cassiere che invita i Soci a provvedere al versamento delle quote per l'anno 1954-1955, al più presto.

Sostenete la nostra Associazione !

Si ricorda che le quote sono le seguenti

Associazione con abbonamento alla rivista "Esperanto" Lire 1.000

Associazione I.F.E.A. - I.F.E.F. - F.E.I. senza abbonamento alla rivista "Esperanto" Lire 800

Associazione ai Soci che pagano direttamente le quote alla F.E.I. Lire 550.

Si rammenta che le quote vanno rimesse al nuovo Cassiere Sig. Licofonte presso Dopolavoro Ferroviario Via XX Settembre 122 - R La Spezia.

## Konferenco en SARLANDO

Laŭ interkonsento en nia 6-a IFEF kongreso en Verona okazos en Sarlando postnia 7-a kongreso en Zürich-tuteŭropa Fervojista konferenco de la 14-a de majo ĝis la 16-a de majo. Tiu ĉi Fervojista konferenco estu grandioza manifestacio por nia lingvo "ESPERANTO", al kiu almenaŭ partoprenu konsiderinda kvanto da partoprenontoj el ĉiu lando.

Ne malatentu la gravecon de la konferenco ĉar la sukceso povos grave kontribui al akcepto de Esperanto kiel Internacia lingvo en Sarlando kaj al plifortigo de I.F.E.F. Jen la unuaj informoj: Organizanto kolego Oskar HÖH, Goethestr. 13, Homburg, Sarlando. Rilatu kun li rekte.